# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 19

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. Okazon kaptu ĉe l' kapo, ĉar la vosto estas ␣ l ␣ t ␣.
2. Prunto amikon ␣ ␣ r ␣ ␣ l ␣ ␣.
3. Ĉe botisto la ␣ ␣ ␣ estas ĉiam kun truo.
4. ␣ ␣ r ␣ ␣ potenca, sed kapo sensenca.
5. La naĝiloj estas sekigitaj kaj kuiritaj en ␣ ␣ p ␣ trovebla tipe en ĉinaj restoracioj.
6. En la azteka civilizacio ␣ ␣ d ␣ ␣ estis praktike nekonataj – ili ekzistis, sed estis uzataj nur en porinfanaj ludiloj.
7. Ĉuvaŝoj, ekzemple, uzas unikajn specialajn ␣ ␣ t ␣ r ␣ ␣ ␣, kiujn enhavas nur Unikodo (ekzemple ***y*** kun du streketoj supre).
8. La virino spiris rapide kaj malfacile, kelke da fojoj ŝi malfermis la ␣ ␣ p ␣ ␣ ␣ por kapti aeron, kiu videble mankis al ŝia brusto.
9. Estas konsilinde, ke virinoj evitu dikan ŝminkaĵon, ĉar la ŝminka ␣ r ␣ s ␣ pliigas la malvarmiĝon de la haŭto, kies supraĵaj vejnetoj povas vundiĝi.
10. Oficistoj de la brita enmigro-servo sukcese apartigas veran turiston de la ␣ ␣ l ␣ ␣.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Arkeologoj f ␣ ␣ ␣ ␣ strangajn malnovajn konstruaĵojn el la tempo kaj stilo de la templanoj, de la vikingoj, kaj eĉ de la fenicoj.
2. Multaj registoj de la EU-ŝtatoj k ␣ ␣ ␣ c ␣ ␣ ␣, ke finfine oni devas realigi longe prokrastitajn reformojn kaj pluevoluigon de la komunumo.
3. La vulkankratero inklinas al ŝtopiĝo; estiĝas premo, kiu fine kaŭzas pli aŭ malpli spektaklan eksplodon, dum kiu ŝtonoj, sablo, p ␣ ␣ ␣ ␣ flugas tre alten en la aero.
4. Kristo aĉetis stokojn da nevenditaj libroj kaj ilin proponis al la publiko je malaltaj p ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ kaj je alta profito.
5. La viro aliris al unu kabineto, malfermis du pordojn, kaj oni povis nun vidi belan banan k ␣ ␣ ␣ ␣, parte plenigitan de akvo.
6. Estas plaĉe imagi, ke en proksima estonteco la l ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ sur stratoj estos anstataŭigitaj per arboj sin lumigantaj!
7. Lingvamaj personoj povas fariĝi studentoj de doktoro E. Privat – ja la verko estas resumo de lia kurso por lingvoscienca f ␣ ␣ ␣ de beletristika fakultato.
8. Atilio majstre tenis en la manoj la f ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ de la konversacio, li kreis, inter la kursanoj, laboreman kaj samtempe amikeman atmosferon dum la lecionoj.
9. Kumaricata trinkis iom el la brulgusta brando kaj komencis rakonti kaj gvidi nin nesenteble foren, en Danuban v␣ ␣ ␣ ␣, en mondon de mirakloj kaj beleco.
10. La diversaj fruktoj de la ĝardeno fariĝis jam m ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ kaj baldaŭ estos deŝiritaj.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| not', plat', tabak', fier', mebl', insul', nutr', imag', milion', pont' |

1. Fine estas almenaŭ teĥnike ␣ m ␣ ␣ ␣ b ␣ ␣, ke oni urĝokaze telestirus la tutan aviadilon por rekte de la regturo malhelpi specifan mismanovron.

2. La monpaperujo nezorgece ĵetita malfermiĝis pli larĝe, sur la marmoran ␣ ␣ ␣ t ␣ ĵ ␣ ␣ elfalis el ĝi kelke da monpaperoj de diversa valoro.

3. Trairinte ŝtonan ␣ ␣ ␣ t ␣ t ␣ ␣ super seka rivero, oni tuj trafas lokon, en kiu Jonušas eksponis ne nur japaneskajn valoraĵojn, sed ankaŭ relikvojn de sia familio.

4. Plejparte la perfortoj okazas inter lernantoj, sed ␣ ␣ t ␣ ␣ d ␣ ␣ plimultiĝo de perfortoj kontraŭ instruistoj.

5. Ĉu, eble, ␣ ␣ ␣ ␣ k ␣ t ␣ ␣ ni enflaru? – li diras, proponante sian tabakujon al la virinoj.

6. Multjardeka prospero de okcidenta kapitalismo, dum kiu konsiderinde kreskis la nombro de ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣, vekis avidojn de homoj en konsumismo kaj amuzosocio.

7. Anna mendadis por si ĉiam novajn ornamojn kaj ĉiusemajne devigadis mian patron pagi grandegajn kalkulojn de tajlorinoj, ␣ ␣ b ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣, kaleŝistoj kaj oraĵistoj.

8. Ŝipeto Sergej somere rondveturigas la vizitantojn en la bela ␣ ␣ s ␣ ␣ ␣ r ␣ kaj kanalaro de la apuda lagego.

9. Ni konstatis duobligon de la kvanto de lernantoj en tiuj lernejoj, kie ni disdonas ␣ ␣ ␣ r ␣ ĵ ␣ ␣ ␣.

10. Vere tiu situacio ne estas ␣ ␣ ␣ r ␣ g ␣ – Eŭropo malbone protektas siajn arbarojn.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Kiam Marilyn Monroe suicidis en 1962, Warhol faris ___ de pentraĵoj, bazitaj sur ŝia foto el la kinofilmo ***Niagara***.
   a. spegulon b. noton c. viandon d. serion
2. Nekutima konkurso okazis en mia urbo – partoprenantoj devis ___ aŭtomobilon: tiu, kiu plej longe eltenis, gajnis novan “Fiat”-aŭton.
   a. puni b. kisi c. soifi d. mensogi
3. La ___ estas vendata al la bakisto, kiu bakas la panon, kiun li vendas al konsumanto.
   a. faruno b. muŝo c. osto d. pinglo
4. La baroka centro de la urbo atestas pri la delikata artosento de la iama riĉa ___.
   a. saparo b. plantaro c. burĝaro d. serpentaro
5. Hundertwasser estis unu el la plej grandaj ___ en la moderna arto tutmonde.
   a. telefonoj b. ĉemizoj c. tegmentoj d. figuroj
6. Ludoviko XIV estis granda malamiko de ___ kaj malpermesis uzi ĝin ĉe sia kortego.
   a. haŭto b. frunto c. tabako d. najbaro
7. Dum kelke da minutoj junuloj kun viglaj vizaĝoj kaj uniformoj de universitataj studentoj plenigis la korton per bruo de interparoloj pli aŭ malpli ___.
   a. laŭtaj b. honestaj c. fieraj d. avaraj
8. Alia ofte traktata temo en 2000 estis la evoluo kaj strategio de la esperantista komunumo, kiu devas ŝanĝi sin adapte al la rapide ŝanĝiĝanta mondo, por ne iĝi areto de ___ manietuloj.
   a. sanktaj b. kuriozaj c. ebenaj d. akraj
9. Skandale kaj nepardoneble estas antaŭprese ___ pri rigora kontrolado de la presotaĵo.
   a. akiri b. kompari c. apogi d. fajfi
10. Konsumantoj volas havi nur plej bonajn pecojn el buĉita besto, oni devis forĵeti la reston, sed oni ja povis uzi kadavrojn ankaŭ por ___ bestojn kaj tiel havi duoblan profiton.
   a. anonci b. honti c. nutri d. imagi